

La religia sinteno de Zamenhof
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 503, 1981.08.06 & 08

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por memorigi la duan Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en Ĝenevo antaŭ 75 jaroj, ni parolis pri la homaranisma penso de Ludoviko Zamenhof. Kaj ni diris, ke ĉefe en la katolikaj medioj oni kontraŭstaris al la Deklaracio pri Homaranismo. Per la respondoj de Zamenhof al la katolika pastro Dombrowski, majo 1906 kaj al s-ro Louis de Beaufront, junio 1906, ni pli intimiĝas kun la religia sinteno de Zamenhof kaj kun kio en ĝi, kio ŝokis la kristanojn, kaj ĉefe la katolikojn.

A.- Pastro Dombrowski, kiel ĉiuj katolikoj, ne akceptis, ke la homaranoj komparu la judan saĝulon Hillel al Jesuo Kristo. Tiurilate jen citaĵoj el la respondo de Zamenhof:

Cl.- "La homaranoj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon, komparadi reciproke la valoron de diversaj religioj kaj de iliaj fondintoj; la ideo detronigi Jesuon Kriston por la kristanoj aŭ Mozeon por la hebreoj aŭ Mahometon por la mahometanoj k.t.p. kaj surtroni anstataŭ ili Hillelon neniam eĉ por unu minuto venis en la kapon de iu homarano. Sian ĉefan religian principon la homaranoj nomis "hilelismo" ne por honori pli Hillelon ol Kriston aŭ Mozeon, sed nur tial, ke la principo, kiu donis al la homaranoj la eblon krei ponton inter ĉiuj religioj, estis esprimita ĝuste de Hillel... La diritan dogmon, kiu prezentus la tutan religian fundamenton, la tutan religian esencon de la homaranismo, ni trovas en formo konforme esprimita nek ĉe Kristo, nek ĉe Mozeo, nek ĉe iu alia, - ni trovas ĝin nur ĉe Hillel. Jen kial nia ideo ricevis la nomon "hilelismo". Hillel diris: "La tuta esenco de nia religio estas la leĝo: "agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi"; ĉio alia estas nur komentarioj"....

A.- En la jaro 1906 la homaranisma mesaĝo de Zamenhof evoluis de hilelismo al homaranismo. Jen tiurilate interesa citaĵo, ĉiam el la respondo al pastro Dombrowski:

Cl.- « ...Grava estas ja ne la nomo, sed la esenco de la afero, kaj cetere nun, por tuŝi nenies gentan aŭ eklezian ambicion, la homaranoj jam mem, kiel oni scias, forigis la nomon "hilelismo" kaj anstataŭigis ĝin per la absolute sengenta, seneklezia kaj senpersona nomo "homaranismo" »

A.- Tiu seneklezieco ne povis tamen esti akceptita de la katolikoj. Tial, la jarojn postajn, estos en la katolikaj medioj ke oni plej vigle kontraŭstaros al la homaranisma idealo. En 1908, la aliĝo al la ido-skismo estos konsiderata de multaj katolikoj kiel bona maniero distanciĝi de la influo de Zamenhof. Tio klarigas kial, en la ido-movado, la katolikaj organizaĵoj estis tiel viglaj kompare al la aliaj, kaj kial, en Svislando, esperanto preskaŭ malaperis en la plimulto de la katolikaj kantonj, profite al efemera disvolviĝo de la ido-lingvo.

Cl.- Kion la katolikoj ne povis akcepti, tio estis la ĉi sekva deklaro de Zamenhof: "Kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon "agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco"; ĉion alian en mia religio mi rigardas nur kiel legendojn aŭ kiel religiajn morojn, kiuj estas enkondukitaj de homoj, por enporti en la vivon difinitan programon kaj spiritan varmon, kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de mia persona deziro."

A.- Responde al pastro Dombrowski Zamenhof skribas:

Cl.- "La homaranismo laŭ la opinio de s-ro Dombrowski estas kontraŭreligia! Kiun la homaranismo detiras de la religio? Ĉu la homojn blinde kredantajn? Sed tiuj ja ne akceptos la homaranismon. Ĉu la homojn libere pensantajn? Sed tiuj ja de longe defalis de la religio, kaj la homaranismo, kontraŭe, celas altiri ilin al la religio! La homaranismo, kiu varbos siajn adeptojn ne per blinda kredigado, sed per admonado, estas ja destinita sole nur por homoj libere pensantaj. La eklezio forigis ilin de la vera Dio - la homaranismo ilin rekondukis al Li..."

A.- Aliloke Zamenhof ankoraŭ skribas:

Cl.- « Ni volas ne pereigi la religion, sed savi ĝin de la senduba pereco, al kiu alkondukis ĝin la batalado inter la prudento kaj eklezio. »

A.- Tiuj asertoj de Zamenhof estis tute simple vera skandalo por la plimulto de la praktikantaj kristanoj, interalie de la katolikoj. Ili eĉ poste riproĉos, ke tiajn diskutojn oni havas en esperanto-gazetoj. Estas fakto, ke malofte en la historio de esperanto, movadaj gvidantoj tiel klare esprimis sian personan manieron koncepti la religion. En la esperanto-gazetaro la neŭtraleco ne nur malpermesas debatojn pri politikaj demandoj, ankaŭ la religiaj estas malpermesataj, se ili devojiĝas de la tradiciaj kredoj.

Cl.- Kaj nun ni legu erojn el la respondo de Zamenhof al Louis de Beaufront:

A.- Ni citas:

Cl.- "Vi diras, ke inter la esperantismo kaj la homaranismo ekzistas nenia parenceco! Sed en tia okazo kial do vi nin tiel atakas? Kial vi tiel timas, ke la mondo intermiksos la ambaŭ ideojn? Tiu ĉi via timo ja tute klare devas pruvi al vi, ke vi senkonscie sentas, ke inter la ambaŭ ideoj ekzistas parenceco tre granda. Lingvo internacia havas la celon, krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato lingva, la homaranismo volas krei tian saman ponton en ĉiuj rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri. Sed ĉu la deziro krei neŭtralan ponton inter la gentoj estas krimo?..."

Kaj jen dua citaĵo, kiu komprenigas, kiel malsimilaj estis la vidpunktoj de Louis de Beaufront kaj de Lazaro Zamenhof :

Cl.- "Vi povas diri, ke la ponto, kiun ni proponas, havas en si diversajn erarojn, - tion ĉi ni tute ne neas, kaj ni kun danko akceptas ĉiujn montrojn de la eraroj, por ke ni povu ilin forigi. En la antaŭparolo al nia broŝuro estas ja skribite tre klare kaj per grandaj kaj dikaj literoj, ke la nuna teksto de nia Deklaracio estas nur provizora, por prezenti la esencon de nia afero, kaj la teksto definitiva estos fiksita nur iam poste, post matura komuna interkonsiliĝo. Sed por kio ataki la tutan aferon en principo?"

A.- Jes, la idea malkonsento estis principa, kaj la respondoj de Zamenhof neniel konvinkis la katolikojn kaj adeptojn de aliaj religioj. Koncerne religiajn demandojn diskuto ĝenerale ne eblas, se oni estas konvinkita, ke la propra kredo estas inspirita aŭ alportita de Dio.

Cl.- Ni konsilas al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la religia penso de la aŭtoro de esperanto relegi en la Originala Verkaro la tutan ĉapitron pri hilelismo kaj homaranismo. Ili malkovros en Zamenhof tute originalan pensiston, kiu bedaŭrinde ne havis la okazon komplete maturigi sian penson. La renkontiĝo homaranisma, kiun li kunvokis por la jaro 1914 ne povis

disvolviĝi, pro la milita eksplodo. Kaj tri jarojn poste Zamenhof mortis lasante sur sia skribotablo projekton de alvoko al kongreso por neŭtrale-homa religio, el kiu Edmond Privat citas kelkajn partojn en sia "Vivo de Zamenhof". La manuskripto bedaŭrinde perdiĝis, kio malhelpas ricevi superrigardon pri la evoluo de la homaranisma penso de Zamenhof.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*